# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Decembro : 5 2021

## MORT-KONDAMNITOJ EN JAPANIO DEZIRAS KONI LA ĜUSTAN DATON KIAM PLENUMIĜOS LA KONDAMNO

Antaŭ kelkaj semajnoj mort-kondamnitoj en Japanio, kiuj atendas la plenumon de la kondamno, prezentis plendon ĉe tribunalo en la urbo Osako. Ili rifuzas la nuntempan aplikon de regulo, laŭ kiu oni sciigas la plenumon de la kondamno al morto nur kelkaj horoj antaŭ ties preciza efektivigo.

Ili, kaj iliaj advokatoj, konsideras, ke tiu estas kruela kaj barbara agado. Tiel, ĉiumatene ili ne scias ĉu temas pri sia lasta vivo-tago. La plendantoj, kiuj nuntempe troviĝas en koridoroj de prizonoj atendante la efektivigon de la kondamno al morto, petis al tribunalo koni, kun sufiĉe da antaŭa tempo, kiam plenumiĝos la kondamno. Laŭ ili, estas necese koni tiun daton por mediti kaj se necese fermi lastajn personajn pripensojn.

Male, la japanaj aŭtoritatuloj opinias, ke tiu ne-kono pri la ĝusta dato evitas seriozajn mensajn perturbojn al mort-kondamnitoj. Antaŭ la jaro 1975 oni sciigis pri la ĝusta dato al prizonuloj, tamen en tiu jaro, unu el ili mortigis sin ĝuste antaŭ la efektivigo de la kondamno. Do, oni decidis ne informi pri tiu dato okaze de ontaj ekzekutoj.



Nuntempe en Japanio 110 kondamnitoj atendas la efektivigon de la juĝo. Dum la jaroj 2018 kaj 2019 Japanio ekzekutis 18 homojn, 13 el ili membroj de *Aum Ŝinrikjo*, apokalipsa sekto kiu atakis per venengaso (sarino) la metroon en Tokio en la jaro 1995. Tiu atako mortigis 27 homojn.

En la jaro 2020 neniu malliberigito en Japanio estis ekzekutita, same dum la kuranta jaro 2021.

# *Vorto de la Semajno*

**Adopti** (tr): Alpreni, per oficiala laŭleĝa akto, iun kiel sian propran filon aŭ filinon.

*Mia fratino vojaĝis en fremdan landon por adopti ĵus-naskitan bebon.*

- **Adoptito:** homo, ĝenerale infano aŭ eĉ bebo, kiun iu igas sian propran filon aŭ filinon post laŭleĝa akto.
- **Adoptanto:** homo, ĝenerale paro, kiu filigas iun post laŭleĝa akto.
- **Adopto-kontrakto:** dokumento subskribita de adoptanto(j) kaj koncernaj aŭtoritatuloj pere de kiu adoptanto leĝe filigas adoptinton.
- **Adopto-kondiĉoj:** nepraj cirkonstancoj aŭ faktoj al kiuj estas submetitaj la adopto, ekz. aĝo de adoptantoj, mon-rimedoj, ktp.



**INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO**

deziras al ĝiaj membroj, simpatiantoj kaj ĝenerale al ĉiuj amikoj kaj parolantoj de la internacia lingvo, la plej sukcesan kaj fruktodonan jaron




Pacon, ĝojon kaj justecon por ĉiuj !

Internacia Jurista Esperanto-Asocio www.esperantojuro.org jurista@esperanto.ac